XXXIII ORDINARA DIMANĈO -15a de novembro 2009

LA FILO DE HOMO KOLEKTOS SIAJN ELEKTITOJN EL LA KVAR VENTOJ

Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM.

Mk. 13, 24-32.

**En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: Sed en tiuj tagoj, post tiu aflikto, la suno mallumiĝos kaj la luno ne donos sian lumon,
kaj la steloj falados el la ĉielo, kaj la potencoj, kiuj estas en la ĉieloj, ŝanceliĝos. Kaj tiam oni vidos la Filon de homo, venantan en nuboj kun granda potenco kaj gloro.**

**Kaj tiam li elsendos la anĝelojn kaj kolektos siajn elektitojn el la kvar ventoj, de la limo de la tero ĝis la limo de la ĉielo. De la figarbo lernu ĝian parabolon: kiam ĝia branĉo jam moliĝas kaj aperigas foliojn, vi scias, ke la somero estas proksima; tiel same vi, kiam vi vidos, ke tio okazas, tiam sciu, ke li estas proksima, ĉe la pordoj.
Vere mi diras al vi: Ĉi tiu generacio ne forpasos, antaŭ ol ĉio tio fariĝos. La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.**

Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo, nek la Filo, sed nur la Patro

Oni nomis "la Bona Novaĵo" la mesaĝon de Jesuo. En Ilia mesaĝo ne estas teruraĵoj, sed nur esperoj. Do, en ĝi ne ĉeestas minacoj, sed pozitivaj realaĵoj por la homaro.

Ni vidu la Evangelion laŭ Sankta Marko en tiu 13a ĉapitro, kiu estas tiel malfacila kaj malsimpla ke la evangeliisto mem avertas la leganto – nome kiu havas la taskon legi kaj interpreti tiun ĉi parton el ĝi, tiun ĉi dokumenton – (v.14) la leganto komprenu.

Sankta Marko skribas: "En tiuj tagoj, post tiu aflikto". Kiun aflikton Jesuo aludas? Li aludas la detruadon de la Templo kaj de Jeruzalemo fare de la romianoj.

Nu, tiun kiun, je la okuloj de izraelido povis ŝajni grandega katastrofo, por Jesuo estas nur la komenco de liberiga procezo por la tuta homaro. Kaj Jesuo parolas uzante tipan lingvaĵon de la profetoj, kaj Li, en la 13a ĉapitro, prunteprenas la profetaĵon pri Babilono de la profeto Jesaja.

Profetaĵo en kiu oni anoncas, oni donas esperon al popolamaso ke "ĉiu reĝimo baziĝanta sur la povo jam entenas en si mem la ĝermon pri detruigo. Kiel diris

la profeto Daniel, “ĉiu giganto havas argilajn piedojn”. Do, Jesuo, uzante la profetan lingvaĵon, ne anoncas katastrofon kiu atakos la mondon, sed Li anoncas katastrofon kiu atakos nur la ĉielajn limojn, nome la lokon kie vivis la diojn kaj antaŭ ĉio la lokon kie emis supreniri la regantajn homojn.

Jesuo diras: ”la suno mallumiĝos kaj la luno ne donos sian lumon”. Suno kaj luno estis diaĵoj veneritaj de la idolanoj. Nu, per la disfalo de Jeruzalemo kaj per la komenco de la agado fare de la disĉiploj ankaŭ tra la pagana medio, tiuj ĉi diaĵoj, kiuj estis veneritaj en la pagana medio, perdos sian brilon. Kiam oni anoncas la lumon de la Evangelion ĉion alian mallumiĝas.

Do Jesuo anoncas la disfalon de ĉiuj povoj kiuj kontraŭas la Regnon de Dio, ”kaj la steloj falados el la ĉielo”. Kiuj estas tiuj steloj? Ili estas ĉiuj homoj havantaj povon, de la faraono, al la imperiestro, al reĝoj, ĉiuj emis supreniri ĝis la ĉielo, ili estis nomitaj “la steloj”. Ekzistas la profetaĵo Jesaja, en la ĉapitro 14a, kie li rilatas ĝuste la reĝon de Babilono kaj diras: ”vi ambiciis supreniri ĝis la ĉielo kaj vi kontraŭe vi estis ĝetita en la infero”. Do, ”vi ambiciis esti kiel stelo”, nome vi deziris havi la dian kondiĉon kaj vi, male, falis en tombo.

Tiam Jesuo anoncas ke per la komenco de la disvastigo de Sia mesaĝo, tiuj steloj, nome la potenculoj komencos disfali ekde la momento kiam tiuj paganaj diaĵoj, suno kaj luno, ekperdos sian lumon.

Kaj poste Jesuo diras: ”kaj la potencoj, kiuj estas en la ĉieloj, ŝanceliĝos”. “En la ĉieloj”, en la Evangelio laŭ Sankta Marko estas la Patro, estas la Filo de homo, estas la anĝeloj. Solaj entrudiĝintoj estas tiuj ĉi potencoj, nome povoj kiuj intencis regi la homan vivon. Kiam estos ekanoncita la Bona Novaĵo tiuj ĉi povoj komencos ŝanĉeliĝi.

Tiam, skribas la evangeliisto: Jesuo diris: ”Kaj tiam oni vidos”, Li ne diras ‘Vi vidos’. Kiuj estas tiuj kiuj vidos? Kiam la potenculoj falas de sia trono, tiam ili vidas “la Filon de homo, venantan en nuboj kun granda potenco kaj gloro”. Kiam la potencoj disfalas, supreniras la povon de la Filo de Homo.

La evangeliisto estas donanta ne minacan mesaĝon, sed grandan esperon: ĉiuj la potenculoj falos. Kaj la potenculo, dum li falas, vidas ke oni levigas la Filon de Homo, nome la plenan homan dignon. Kaj Jesuo daŭrigas, ”Kaj tiam li elsendos la anĝelojn” - la anĝeloj estas iliaj kunlaborantoj - kaj li kolektos siajn elektitojn”, kiuj ne plu estas la elektitoj de Izraelo, sed ili estas la novaj elektitoj, el la nova komunumo de la Regno, “de la limo de la tero ĝis la limo de la ĉielo, kiel nova komenco”, nome, la suferoj kaŭzitaj de la superregado finiĝos. Ili vidos sian finon ek de la komenco de tiu nova epoko, de tiu nova realaĵo iniciatita de la Filo de Homo.

Poste Jesuo avertas: ”De la figarbo lernu ĝian parabolon”. Temas pri konata parabolo. Kiu estas tiu parabolo? Ĝi estis tiu kiu antaŭis, en la 12a ĉapitro, tiun

pri la murdaj vitkulturistoj al kiuj oni forprenos la vinberarbujon kaj ĝi estos donita al aliaj popoloj.

Jesuo estas anoncinta ke, per la detruo de Jeruzalemo, la Regno de Izraelo finiĝos, sed komenciĝos la Regno de Dio, do, temas pri mesaĝo plene pozitiva. Kaj Jesuo avertas: ”kiam vi vidos, ke tio okazas”, tio estas la detruo de Jeruzalemo, la disvastigo de Ilia mesaĝo en la pagana medio, “Tiam sciu,” kaj tie la traduko diras “ke li estas proksima, ”sed ne estas “li”, “Tiam sciu, ke ĝi estas proksima, ĉe la pordoj”.

Kio estas ĉe la pordoj? Jesuo jam diris tion al ni, “La Regno de Dio estas proksima”, sed, ĝis kiam la disĉiploj pripensas ankoraŭ la superregadon de Izraelo kaj la hegemonion de Izraelo, la Regno de Dio ne povas komenci, ĉar la Regno de Dio estas universala, ĝi ne estas ligita al iu popolo. Kaj Jesuo garantias, ”Ĉi tiu generacio ne forpasos, antaŭ ol ĉio tio fariĝos.”

Fakte en la 70a jaro post Kristo okazos la detruo de Jeruzalemo. Kaj, uzante proverbon kiu signifas “ĉio forpasos, la ĉielo kaj la tero forpasos”, Li ne estas diranta ke finiĝos la ĉielo aŭ la tero, sed la du kontraŭoj “ĉielo kaj tero”signifas la tuto, tio estas garantio, absoluta certeco. ”La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos. “Do, la disfalo de Jeruzalemo permesos la eniron de la gojoj en la Regno de Dio. Tion Jesuo asertas kun certeco.

“Sed pri tiu tago kaj la horo”, ĉi tie Li rilatas al individua aŭ komuna persekuto, li diras: ”Scias neniu”, ĉar, kompreneble, anonci tiun Bonan Novaĵon alportos la persekuton. “Eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo, nek la Filo, sed nur la Patro”. Tiu estas invito tute fidi je Li, nenion prizorgi. Do, anoncu la Bonan Novaĵon, tiu ĉi Bona Novaĵo vidos la disfalon de la povoj kiuj ĝin kontraŭas, kiu, nature reagos per perforto, sed vi, bonvolu ne maltrankviliĝi ĉar la Patro tute prizorgos vin.